

# **SUDFRANCIA★STELO**

Nº 156 - 1a kvaronjaro 2001 - 1° trimestre 2001 - 10 F

Dulingva bulteno eldonita de la Esperanto-federacio de Langvedoko-Rusiljono  
*Bulletin bilingue édité par la fédération d'espéranto du Languedoc-Roussillon*  
Jarabono/Abonnement : 40 F al pck / au CCP 956-28 P Montpellier (fédé d'E°)

## **PRINTEMPAJ RENDEVUOJ**

Renaskiĝas la naturo post longa pluva vintro . Ni ankaŭ revigliĝu kaj partoprenu iujn el la anoncitaj E°-eventoj . Paske disvolviĝos SAT-Amikara kongreso en Chambéry kun riĉa programo . **Nia federacia kongreso okazos sabaton la 19an de Majo**, ne plu en Agde sed apud Vias (precize sur la nacia vojo 112, okcidente de tiu urbeto) . Ne forgesu rezervi vian tagmanĝon (60F) . La limdato estas prokrastita ĝis la 1a de Majo (vidu sur paĝo 2) . Samloke, sur la kvarstela kampadejo kaj ferivilago "Bieno La Drakejo" sekvos la unu-semajna staĝo, pli frue anoncita en Batipaume . Legu la paĝon **4** sub la rubriko Béziers por trovi pli da detaloj . Ne forgesu, ke la aliĝkotizo plialtiĝas post la 15a de aprilo...

## *Rendez-vous de printemps .*

*La nature renaît après un long hiver pluvieux .  
Retrouvons aussi notre entrain et participons à  
quelques uns des évènements d'espéranto annoncés .  
A Pâques se déroulera le congrès de Sat-Amikaro à  
Chambéry, avec un riche programme .*

**Notre congrès fédéral aura lieu samedi 19 Mai,**  
non plus à Agde mais près de Vias (exactement sur  
la RN 112, à l'ouest de cette localité) . N'oubliez  
pas de réserver votre repas (60 F) ! La date limite  
est repoussée au 1<sup>er</sup> Mai (voir p. 2). Au même  
endroit, sur le camping 4 étoiles et village de  
vacances

*"Domaine de la Dragonnière" suivra le stage d'une semaine, annoncé précédemment à Batipaume.*

*Lisez la page 4 sous la rubrique Béziers pour trouver davantage de détails. N'oubliez pas que le tarif de l'adhésion augmente après le 15 avril...*




Pentekoste pluraj naciaj E°-asocioj kuniĝos en Limoges . Fine, ni proponas al vi denove **amikan semajnfinan renkonton** . Lastjare ĝi ebligis la malkovron de la nordo de mia regiono en Lozère; ĉiujare ĝi ebligos malkovri tute alispecan lokon, proksime de Olargues , centon da kilometroj okcidente de Montpeliero . Vidu detalojn p.2 kaj jam notu la datojn, **la 16an kaj 17an de Junio** . Kaj se vi intencas partopreni kongreso(j)n aŭ aliajn aranĝojn en somero, ne tro prokrastu vian aliĝon !

Gis !

J.H.

*A la Pentecôte plusieurs associations françaises d'E° se retrouveront à Limoges .Enfin, nous vous proposons de nouveau une rencontre amicale de fin de semaine . L'an dernier, elle a permis la découverte du nord de notre région en Lozère . Cette année elle permettra de découvrir un endroit d'un caractère tout à fait différent, près d'Olargues, à une centaine de km à l'ouest de Montpellier . Voyez les détails p.2 et notez déjà la date, les 16 et 17 Juin . Et si vous avez l'intention de participer à un ou des congrès ou d'autres manifestations en été, ne repouvez pas trop votre adhésion !*



# FEDERACIAJ AFEROJ

## BULTEGO

Ĉu vi repagis vian abonon al SFS? Se jes, bonege; se ne, faru baldaŭ! Pagu 40 F al via grupkasist(in)o kaj, se vi estas izolita esperantisto, sendu ĉekon al la federacia kasistino **Lucette Négron, 40 Chemin des Amandiers 34400 Lunel** -kun indiko pri la kialo de via pago! Ĉeko je la nomo de : **fédération d'Esperanto du Languedoc-Roussillon**. Se vi uzas poštēkon, vi povas ĝiri la sumon rekte al CCP/pêk 956-28 P Montpellier. Anticipan dankon faciligi nian laboron


*Avez-vous renouvelé votre abonnement à SFS?  
Si ce n'est pas encore fait pour cette année, voyez le trésorier de votre groupe ou, si vous êtes isolé(e), envoyez votre chèque à la trésorerie de la fédération (adresse ci-dessus) ou, si vous avez un CCP, versez la somme directement au n° indiqué.  
Merci à l'avance!*

## FEDERACIA KONGRESO

**Sabaton, la 19an de majo**, de la 10a ĝis la 17a horo en "Domaine de la Dragonnière", proksime de Vias (34). Se vi deziras partopreni la tagmanĝon surloke (60F), bonvolu informi nian sekretarion **antaŭ la 1a de Majo**. Adreso : Charles Gérard-Voinçon 4, Rue Dr Rives 66000 Perpignan. Tel-numero (vespere) 04 68 55 51 77

## STAGO DE AGDE

Ĝi sekvas nian federacian tagon (**de la 19a ĝis la 26a de majo**), disvolviĝos en agrabla kadro kaj agrabla etoso. Profitu la unikan okazon por perfektiĝi en la internacia lingvo, helpe de sindonemaj kaj kapablaj geinstruantoj. Informojn volente donos al vi Christian Herbette, Domaine des 7 Fonts, 34300 Agde (Tel. 04 67 21 86 61). Vi povas dormi ekstere, se vi preferas; vi povas ankaŭ veni kun ruldomo aŭ loĝveturilo (tre favora tarifo). Legu ankaŭ la rubrikon pri Béziers.



**ALIGILO :** dormolokoj dezirataj :

Se tranoktado en nia hejmo, bonvolu telefoni. 15 dormolokoj (alporti litajojn)  
Estas dormejoj komunaj kaj individuaj. Eblas ankaŭ tendumi.

## Memorindaj datoj :

- Hodiau mem por renovigi la abonon al SFS,
- la 1an de Majo (plej malfrue) por mendi la tagmanĝon de la federacia tago en la "Bieno de Drakejo",
- la 15an de Majo por aliigi la stagon samloke (plialtiĝo de la aliĝotizo),
- la 8an de junio (plej malfrue) por la amika semajnfino apud Olargues (34).

## AMIKA SEMAJNFINA RENKONTO

### sabaton, la 16an kaj dimanĉon, la 17an de junio

en Les Sagnes, pitoreska vilaĝeteto, proksime de Olargues (34), ĉe najd gesamideanoj Henryka Olek kaj Gérard Paing. Vidu la programon dekstre kaj resendu la aliĝilon ĉi-sube **antaŭ la 8a de junio** (ĉeko je la nomo de Henryka Olek) al Gérard Paing Les Sagnes, 34390 Olargues Tel/fakso 0467977910

### Programo de la semajnfino en Les Sagnes

#### Sabaton, la 16an de junio :

- 10h-12h30 : Bonvenon; elektro de dormloko, vizito.
- 12h30 : Aperitivo kaj tagmanĝo subĉielo, ombre de kverko.
- 15h-19h : Diversaj eblecoj :
  - \* piedpromenado sur montareto tra kaštanarboj aŭ aliro al rivereto, bano (ne forgesu banveston!)
  - \* ludoj : tabloteniso, globludo.
- 20h : Vespermanĝo (*Estas malfacile fari menuon 3 monatojn antaŭ... sed ni povas garantii, ke estos bonguste*)
- Komuna vespero : Gérard kaj Henryka rakontos sian vojaĝon tra Brazilo . Bonan nokton !

#### Dimanĉon, la 17an de junio :

- 8h-10h : Matenmanĝo
  - 10h : Vizito de Olargues (XIIa jarcento) aŭ promenado ĝis "le Mas du Gua".
  - 12h30 : Tagmanĝo kaj ĝis la revido !
- Eblas ankaŭ partopreni nur unu tagon (sabaton aŭ dimanĉon).**

familia nomo	numero da partoprenontoj	Sabata tagmanĝo	Sabata vespermanĝo	Dimanĉa matenmanĝo	Dimanĉa tagmanĝo	Sume
.....	.....	50F x ...	30F x ...	10F x ...	50F x ...	.....F

## Libro de B-M. Robineau

La federacio aĉetis kaj lasis en bibliotekoj kvindekon da libroj de niaj vojaĝemuloj . Sed, sed... iuj slipoj revenis sen indikoj aŭ kun indikoj ne uzeblaj por kontaktoj, eĉ foje iuj slipoj tute ne revenis ! Kion konkludi ? Ĉu la personoj, kiuj "volontulis" por disdoni la librojn, bonvolus **plej baldaŭ resendi la inform-slipojn** ? Estas bezonataj nur kelkaj minutoj por respondi la demandojn ! Nur vi sur la tereno konas la nomojn de la kontaktindaj homoj . Alivorte vi estas neanstatua geblaĵ... kaj, konata refreno, E° estas **ĉies afero** .

Fine de septembro B. Robineau prelegos en Clermont-Ferrand, komence de oktobro li prelegos en Tuluzo . Inter la du , li volonte prelegus en nia regiono, do **je plej taûga dato por varbi por la novaj kursoj**, tuj post la forumoj de asocioj. Kiu pretus helpi lin/nin por trovi lokojn por prelegoj ? Nun estas decidataj la programoj de la kulturaj asocioj por la venonta "sezono" . Kaj se vi ne estas plene konvinkitaj pri la eventuala profito de tia vizito, vidu dekstre eltiraĵojn de "E° Ile de France" de februaro **kaj de savoja gazeto (decembro 2000)**. E° estas **ĉies afero** !



## UNE RICHE EXPERIENCE 8 ANS AUTOUR DU MONDE

Une conférence audiovisuelle a eu lieu à Orly le 14 décembre. Pendant huit ans, Bruno et Maryvonne Robineau ont parcouru la planète, échangeant leur travail contre gîte et couvert, s'associant au labeur des paysans, se fondant dans l'intimité de leurs familles, partageant leurs repas, se gelant aux mêmes froidures, risquant les mêmes maladies.

De cette extraordinaire aventure, ils ont rapporté un vibrant témoignage. Par leur conférence, le public a découvert que l'espéranto n'est pas une utopie. Un outil neuf et attrayant pour présenter l'espéranto au grand public. Un récit-passion, un grand moment de rêve, d'humanité et de poésie, qui donne une nouvelle image de la langue internationale et peut stimuler les associations culturelles, les bibliothèques, les collèges, lycées,...

## L'espéranto plutôt que l'anglais

Bruno Robineau pensait qu'avec l'anglais il s'en tirerait facilement. « **Contrairement aux Idées reçues, l'anglais n'est pas aussi répandu qu'on le croit. Et quand il est parlé, il l'est mal ou avec des accents qui le rendent incompréhensible. C'est avec l'espéranto que nous avons eu le plus d'échange** » Bruno défend l'espéranto. Cette langue simple, logique, que l'on

peut apprendre rapidement, compte un réseau mondial d'espérantistes, et même une littérature.

« **Quand on pense aux sommes faramineuses dépensées à Bruxelles en traductions orales et écrites pour les seuls pays de l'Europe, il serait temps de prendre aussi une langue unique** », remarque-t-il. L'espéranto? « **Les puissances anglophones ne le**

**voient pas d'un bon œil, tout comme les Français l'ont fait en 1922 quand la SDN avait adopté le projet de l'espéranto comme langue internationale.** » Sa démonstration a été convaincante, puisqu'à l'issue des deux conférences, plusieurs personnes se sont renseignées pour les cours ou stages d'espéranto proposés par l'UTL.

## Mondfamuloj :

Henryka Olek kaj Gérard Paing, kiuj invitas vin al amika semajnfino en junio (vidu la antaŭan paĝon), jus revenis de plurmonata vojaĝo tra Brazilo . Inter aliaj ili partoprenis la tutmondan forumon de Porto Alegre kiel delegitoj de la franca verda partio . Parenteze Brazilo estos la lando de la UK en 2002 ( Fortaleza )


Sur la bildo dekstre, Gérard (maldekstre kun kaskedo) disdonas dokumentojn pri E° en la forumeo de Porto Alegre . Raportoj kaj fotoj pri niaj geomikoj estis trovblej sur la reto, do ,sen fanfaroni, oni povas nun prave aserti, ke iuj el niaj federacianoj estas mond-famuloj . Espereble ni povos audi, vidi aŭ legi ion pri ilia sperto ( *responde p. 2* )



## Pasporta Servo :

### Senpaga gastigado de E°-parolantoj tra la mondo

En 1998 la listo enhavis la adresojn de 871 gastigantoj en 75 landoj, en 99 945, en 2000 1075 kaj ĉi-jare **1161 en 80 landoj** . Do, nekontesteble la progreso estas regula . Francio okupas la unuan lokon (prizorgas Jogos) kun 103 adresoj : 3 en Montpellier, novaj adresoj en Ariejo kaj apud Narbonne,ktp. Gastigantoj ricevas la libreton senpage; la aliaj povas aĉeti por plani vojaĝon aŭ simple por montri la libreton varbeme . Ju pli da adresoj en la libreto, des pli valora ĝi estos . Kial ne fariĝi gastiganto(vi-mem decidas pri la kondiĉoj de akcepto)?Akceptonte gaston, "vi trovos plej interesan mondon en via propra hejmo" !



## **EN LA GRUPOJ :**

*Henri Négron, la edzo de nia sindonema kasistino, forpasis en Lunel la 28an de februaro .  
Al Luette Négron kaj al ŝiaj familiianoj ni prezentas nian profundan kondolenecon .*

### **BEZIERS :**

Venontaj kunvenoj : sabaton, la 21an de aprilo, la 12an de majo, la 9an de junio .  
Ĉiuj kunvenoj estas je 14h30 en la Domo de Asocioj .

Vojago de Irananoj : Ili restadis du tagojn, de la 2a de februaro posttagmeze ĝis la 4a (foriro matene je la 9a). Do fakte nur unu tago estis kompleta . Ni manĝis kune en la MVA . La Iranianino preparis por ni bonegan legomosupon ! Poste okazis la prelego . Nur la turisma aspekto estis prezentita - supraje ! Evidente la prelego ne entenis politikan vidpunkton . Sed ĉu ni povus atendi aliajn ? La tuta kunveno estis filmita per kameskopo : ĉu libere ? ĉu ordono de la irana registaro ? Oni povas konsideri, ke kelkaj el ni estas elrevigitaj . Sed ĉu tio povus okazi alimaniere ? Fakte, kion oni povus atendi ? Tamen la turisma parto povintus esti pli alloga kun pli da bildoj . Bedaŭrinde . Ambaŭ estis tre afablaj, sed kion ili povus pli precizigi ?

Staĝo : Atentu ! Atentu ! Jes la staĝo okazos je la antaŭviditaj datoj (19a-26a de majo) sed NE en Batipaume . Do uzu la aliĝilon, kiun vi trovis en la lasta SFS .

Kial tiu ŝanĝo ? Christian klarigos tion al vi detale en la komenco de la staĝo . Nun suficias scii, ke la estraro de Batipaume multe plialtigis la prezojn kaj ke la komforto ne estus tiel bona kiel antaŭe .

Do ni serĉis alian solvon. La domaine de la Dragonnière (inter Agde kaj Béziers) proponis al ni pli favorajn prezojn . Ni estos loĝataj en dometoj (mobilhomes) . Ĉiu entenas 2 ĉambrojn bone disigatajn per manĝo-ĉambro - kuirejeto . La tualetejoj estas por du ĉambroj . Ĉiu dormo-ĉambro estas por unu aŭ du personoj .

Kompreneble ni manĝos en komuna manĝo-ĉambro . Vi havos la uzon de naĝejo kaj tenisejo . La maro estas iom pli malproksima ol en Batipaume : 5 kilometroj . Se vi havas ruldomon, vi povos uzi ĝin surloke kaj manĝi kun ni ĉiuj . Ne estas multaj arboj sed la sezono taŭgas por suno .

Tiu solvo estas provo . Ni esperas, ke tiu ŝanĝo ne ĝenos vin kaj ke vi aliĝos multaj kaj rapide por faciligi la laboron de Christian . Ĝis baldaŭ !

N.B. Se vi vojaĝos pertrajne : haltu en la stacidomo de Béziers; iu atendos vin .

### **MENDE :**

La okan de marto en la municipa biblioteko okazis diskutrondo pri la libro de Ges. Robineau, pli frue donacita de la federacio . Partoprenis dekkvino da personoj . Ĉiuj akordiĝis por diri, ke tia sperto estas speciale interesa legaĵo kaj iuj konfirmis la verecon de la raportoj . Estis nur bedaŭro ne legi pli detale la eldirojn de la renkontitoj .

Anstataŭ literatura diskuto, fakte estis demandoj pri E° kaj Ges. Bernard kaj Hénin provis respondi . Vendigis unu libro de Ges. Robineau kaj alia de C. Piron; du junaj virinoj interesiĝas pri E° .

### **Avis LN du 12 janvier**

Appel aux amis de l'Espéranto ! Faites-vous connaître, pratiquons ensemble l'Espéranto, F. Bernard. Tél/Fax. 04.66.48.58.48.

### **MONTPELLIER :**

La ĝeneralaj kunvenoj (atentu, ke la vorto "asembleo" ne taŭgas en tiu kazo) okazis dufoje, ĉar dum la unua kunveno de la 11a de januaro la raportoj ne estis akceptitaj . Komence de la eksterordinara kunveno de la 3a de februaro (29 personoj ĉeestantaj aŭ reprezentataj) oni omaĝis al Sro Pierre Martinez, jus honorigita per la Honora Legio pro heroajoj dum la lasta mondmilito . P. Martinez instruas esperanton jam de longe, kun sindonemo, afableco, humuro kaj precipice modesteco . Pro la ampleksa deficitulo lastare de la "semajno" de Sète (pli malpli 10 000F) kaj la manko de informado tiurilate, la kultura centro decidis ne plu respondeci pri la organizado de la semajno, kiun pritraktos alia kreota asocio . Demisiis la dejoranta skipo (prezidantino : Yvette Vierne; sekretario : Louis Ensuque; kasistino : Claudine Poncy) . Estis elektita nova skipo (prezidantino : Annick Tora; sekretariino : Rosa Aumeunier; kasistino : Jeanne Bès) Sidejo de la kultura centro ĉe la prezidantino : Résidence Les Pins - CD 17 - Appt. 13 / 1577, avenue de Maurin, 34070 Montpellier .

Dankon al la malnova skipo pro la multjara laboro; bonan sukceson al la nova skipo !

**Kunvenoj :** dum la januara kunveno, kiun partoprenis deko da personoj, Hanna Cayzac rakontis amuzajn anekdotojn kaj R. Aumeunier raportis pri sia "odiseada" vojago de Montpellier al Poitiers pertrajne, kiu, pro strikoj, daŭris unu tagon kaj duonon anstataŭ sep horojn !

Dum la kunveno de la 1a de marto (dudek partoprenantoj, rekorda nombro !) en Escoutaïre ni bone amuziĝis . Ĉiuj rakontis anekdotojn aŭ diris humurajn poemojn . La etoso estis agrabla . Pro la printempaj ferioj, la venonta kunveno estos la **3an de majo**, samloke samhore .

**NDLR :** SFS volonte aperigos la amuzajn anekdotojn rakontitajn dum la kunvenoj de la Kultura Centro .

**Komunaj tagmanĝoj :** Ĉar estas nun 4 E°-asocioj en Montpellier, estas bone sin retrovi ĉiumonate ĉirkaŭ bona tablo . Disvolviĝis komuna tagmanĝo en tre amika etoso la 3an de februaro en Montpellier en tesalono "Sweet Time", alia okazis en Le Crès, en la restoracio "Le San Francisco" (atingebla per la buso n° 3a de la haltejo Le Corum) la 24an de marto. Pri la venontaj tagmanĝoj kontaktu la sekretariinon, tel-n° 04 67 22 37 24 . Ĉiuj estos bonvenaj . Ĝis !

### Espéranto, Culture et Progrès (Esperanto, Kulturo kaj Progreso = **EKP**)

estas la nomo de la nova asocio fondita por pluvivigi la "semajnon" de Sète . La estraro konsistas el : prezidentino : Yvette Vierne ; sekretariino : Evelyne Banaszek ; help-sekretariino : Françoise Lefebvre ; kasisto : Nicolas Karatzaferis . Sidejo ĝe la prezidentino : 5,Rue du Docteur Roux 34090 Montpellier . Notinde, ke la informoj aperintaj en la lasta bulteno daure validas kaj ke la datoj anoncitaj ( de la 25a de aŭgusto ĝis la unua de septembro) restas senŝanĝaj . Ni memorigas, ke la aliĝkotizo plialtiĝas je la unua de junio, do ne forgesu aliĝi ĝustatempe .

*Bonan sukceson al la venontaj "internaciaj semajnoj" de Sète !*

### "Réinsertion et Espéranto" : UNUA KONTRAKTO !

*Laiu raporto de Francis Bernard*

La asocio "Reintegriĝo kaj esperanto" festis la 25an de januaro 2001 en Montpellier sian unuan kontrakton kun la esperantistino Zohra Boubker, kun la ĉeesto de kvardeko da esperantistoj kaj simpatiantoj . La estraro de la E°-federacio de Langvedoko-Rusiljono estis reprezentata .

Ni precizigu, ke la asocio "Reintegriĝo kaj esperanto", kiel dunganto, subskribis kontrakton de nedeterminita daŭro . Nia junia esperantistino estos do la proparolantino de esperanto multmaniere, inter aliaj ŝi ricevis kontrakton de junuldungo por fari prelegojn kaj kursojn en lernejoj. Krome oni povas alvoki ŝin por pagendaj prelegoj kaj kursoj . Ŝi mem devos trovi aliajn merkatojn : tradukojn por gvidfolioj de komunumo, por reklamoj de firmaoj, por noticoj, ktp.

La vespero disvolviĝis en varma etoso, des pli ĝuinda ke regalis nin bufedo kun bongustaj mangajoj .

*Denove gratulojn al la respondeculoj de la asocio kaj plensukceson al Zohra !*

*Fine de la jaro estos dua kontrakto . Thierry Saladin renkontis 110 gejunulojn, el kiuj du 25jaraj estis elektitaj : Anne-Claire kaj Patrick . Zohra instruas al ili esperanton .*

**Nova kodo de la hejmpaĝo de "Réinsertion"**  
<http://reinsesperanto.multimania.com>

### PERPIGNAN :

Dum la jarfinaj festoj (Kristnasko kaj Novjaro) nia Kultura Centro organizis en sia montrofenestro malgrandan ekspozicion . Kun la Krishnaka Paĉjo, bondeziroj esprimitaj en esperanto, kelkaj libroj, girlandoj kaj diversaj kristnaskaj aĵoj .

*La sidejo (72, Avenue du Général de Gaulle) estas malfermata ĉiu sabaton matene (inter la 9a kaj 11a h) .*

*Nun du personoj de joras . Tel-n° : 04 68 34 22 18 . Semajnfine, sabate kaj dimanĉe, la sekretario estas kontaktebla per du tel-noj : 06 71 04 19 73 aŭ 04 68 55 51 77 (hejme) . Dekstre anonco en "L'Indépendant" (9-1)*


La grupo partoprenos komence de septembro la festivalon "Visa pour l'image" per eksposizio en la montrofenestro kaj la 6an de oktobro "Babels en Perpinyà", kiun organizos GFEN 66 okaze de la jaro de eŭropaj lingvoj .

*"La Semaine du Roussillon"*  
*raportis en la n° 252 (15-21 II)*  
*pri okazonta filatelia eksposizio omaĝe al Joan Amades .*  
*La temo estos Esperanto kaj Zamenhof kaj ĉiuj filateliaj kontribuoj estos bonvenaj .*

### **Cours d'espéranto**

Ce mardi, cours de langue internationale espéranto ; à 15 h perfectionnement. Le Centre culturel des P.-O. organise des cours par correspondance, cours d'initiation pour tout public. Le siège de l'association est ouvert tous les mardis de 14 h 30 à 17 h, tous les samedis, de 9 h à 11 h, au 72, avenue du Général-de-Gaulle à Perpignan. Tél. 04 68 34 22 18 ou 04 68 55 51 77. e-mail : charles.gerardvoincon@laposte.net

Les élèves des cours d'espéranto pourront consulter le dictionnaire "Espéranto catalan" édité par Carmen Llapart de Figueires.



L'Amicale Philatélique "El Jardí" de Sant Quinti de Mediona (Catalogne) a rendu hommage en 1986 à Joan Amades i Gelat, qui a su recueillir les chansons, les proverbes et les traditions catalanes et qui a vécu plusieurs années à Sant Quinti de Mediona. Joan Amades était un grand espérantiste, et c'est pour cette raison que cette amicale monte une collection sur l'espéranto et Zamenhof et recherche tout document philatélique sur ce sujet.



\*\*\*\*\*

## **MANIFESTACIOJ : Tri tagoj en Montpellier**

La 8an, 15an kaj 16an de februaro 2001, okaze de la procesoj de José Bové kaj de liaj kunuloj de la sindikato "Confédération paysanne" (pro detruo de OGM kaj malmunto de McDo en Millau), multaj asocioj rendevuis en la parko de Peyrou apud la tribunalo .

Thierry Saladin kaj Patrice Brandy instalis budon (faritan de ili mem) por proponi Esperanton kiel rimedon al la tutmondiĝo. Esperantistoj de Montpellier, Béziers, Villeneuve sur Lot kaj de Lozère helpis ilin. Dum tiuj tri tagoj multaj personoj interesigis pri la internacia lingvo. Inter aliaj rimarkoj, oni povas citi :

- Mi jam aûdis pri esperanto .
- Ĝi estas bona por kontraui la usonan hegemonion .
- Kiel esperanto estas rimedo al la tutmondiĝo de la ekonomio ?
- Ĉu esperanto ne forigus la aliajn lingvojn ?
- Kiel oni povas lerni ĝin ?

Ni disdonis dokumentojn kaj prezentis la franca revuon "Esperanto-Info", kiu celas konatigi tiun lingvon .

Kelkaj homoj abonis ĝin .

La trian tagon, je la 15a horo, ni forprenis nian banderolon kaj maršis dum 3 horoj kaj duono en impona defilado ĉirkaŭ la centro de la urbo kun proksimume 15 000 manifestiantoj . Spektantoj, ĉe la fenestroj kaj sur la trotuaroj, fotis kaj filmis . Dume, Emile Mas distribuis la prospekton de Sat-Amikaro :"les associations face à la mondialisation" (la asocioj antaŭ la tutmondiĝo) .

Francis Bernard

*Redoni al Cezaro...*

*Por kompletigi la raporton, parto de la artikolo aperinta en "Midi Libre" la 9an de februaro .*

*Ne temis ĝustadi pri budo de la Montpelieraj esperantistoj ...*

*Same, kiam cirkulero de Sat-Amikaro indikas, ke la budo estis prizorgata de "Réinsertion et E°" kaj de la asocioj de Montpellier kaj Béziers, fakte respondecis "Réinsertion" kaj kelkaj individuaj esperantistoj . La asocio ne estis kontaktitaj kaj teorie restas neûtralaj .*

**Paysans, syndicalistes, chômeurs, anarchistes et saltimbanques...  
Ils étaient tous là pour soutenir « José »**

A chaque déplacement de l'homme à la pipe, c'est toute une galaxie associative et politique qui s'invite et déploie ses étendards.

Ecologistes, anarchistes et associations de chômeurs ont pignon sur rue. Un drapeau palestinien vient se glisser

dans le rouge occitaniste. Le stand de la Ligue communiste révolutionnaire côtoie celui d'Attac, association anti-mondialisation... ou des espérantistes montpelliéens, « une langue qui permet une communication égalitaire ». A mi-chemin entre marché biologique et Fête de l'Humanité, cette journée qui a culminé avec une manifestation d'un millier de personnes a mêlé les genres.

\*\*\*\*\*

## **CE NIAJ NAJBAROJ**

### **ARLES :**

**Internacia kurso** . Ĉijare sekvas la kurson 1 Italino, 1 Ĉekino, 1 Alĝeriano, 1 Franco, 2 Hispaninoj !

Estas atendataj aliaj personoj, kiuj ĝis nun ne havas taûgan horaron . Du studentoj sekvas la perkorespondan kurson .

**Festo en Junio** : la 100a datreveno de la Leĝo 1901 okazos de la 21a ĝis la 24a de junio. Samtempe nia grupo festos sian 90an datrevenon . Dank'al parto de la arĥivoj de Honoré Bourdelon (forpasinta en 82) ni provos fari ekspozicion. Inter la dokumentoj estos leteroj de Lydia Zamenhof, kiam ŝi instruis E-on en Francio .

### **TOULOUSE :**

Informoj pri la loka kultura centro (EKC) estas troveblaj sur la reto (pri la lokaj radioelsendoj, la komunaj manĝoj, la kursoj kaj lingvaj semajnfinoj) . La federacio havas novan estraron : J. Cash estas la prezidentino, C. Lavarenne la sekretario kaj F. Martorell la kasisto . Ĝi planas cirkuleron ĉiun trimestron .

En Majo EKC rezervis tagon por konigi E-on, inter la tago de Eŭropo (9/5) kaj la forumo de lingvoj (20/5) .

La bulteno "La krokodilo" mencias la venontajn manĝo-klaĉojn de la 6/4, 4/5, 1 aŭ 8/6 kaj raportas kun koloraj fotoj pri la preparado de filmo fare de la staĝanoj de Arroud (09) .

La loka televido TLT akceptis 4 esperantistojn por 25minuta elsendo "Memoro" pri la temo E° la 12an de marto. Intervenis C. Lavarenne (historio), M. Lafosse (fervojo), F. Martorell (muziko), JM Cash (Pasporta servo kaj la movado). Fine oni ekparolas pri projekto de festo por Novjaro...

## NACIE, INTERNACIE

### Nova bulteno

Ne plu aperos "Franca Esperantisto"; la nova bulteno, post konsultado de la membroj de Espéranto-France estos "Le Monde de l'Espéranto". La unua numero baldaù alvenos kun novaj vesto kaj enhavo, grandparte francaj. Ĝin redaktos Christian Lavarenne. Aperitmo : ĉiun duan monaton. Jam sendu viajn kontribuojn por la dua n° sub la formo de raportoj, redaktitaj artikoloj, eventuale kun fotoj, al E°France Le Monde de l'Esperanto, 4 bis rue de la Cerisaie, 75004 Paris aù rete al [mondo@esperanto-France.org](mailto:mondo@esperanto-France.org). Por rapidaj informoj pri estontaj eventoj, informu koncize "Okazas" je la sama adreso aù [okazas@esperanto.org](mailto:okazas@esperanto.org). Fine, se estas bone informi nacie ne forgesu simple informi federacie. Vidu la adreson sur la lasta paĝo !

### Kongreso de Chambéry

Diligenta skipo aktive preparas la paskan kongreson de Sat-Amikaro. Menciindaj eventojo : la 15an de aprilo, je la malfermo de la kongreso, la loka posto uzos porokazan **stampon** (nur en tiu tago). Mardo la 17a estos informtago kaj **Claude Piron** prelegos kaj gvidos debaton en la franca pri "la defio de lingvoj por Eŭropo kaj la mondo". Post la kongreso, la 18an de aprilo en universitato Marcoz **kolokovo** pritraktos la temon "plurlingvismo kaj internacia lingvo". Kompreneble ankaù la kutimaj programeroj, ekskursoj, ktp. Aliĝilo estas havebla ĉe SFS.



### Kongreso de Limoges

Pentekoste (de la 2a ĝis 4a de junio) por pluraj asocioj : UFE, Jefo, GEE, AFCE, FET, E°-Limousin. La kongresa temo estos : **2001, eŭropa jaro de la lingvoj**. Kunvenoj, prelegoj, aktivulaj laborgrupoj, surlokaj vizitoj, ekskursoj. Aliĝilo estas havebla de SFS; informoj ĉe : [esperanto-france.org/actualites](http://esperanto-france.org/actualites)



### Universala Kongreso de Zagreb

**Unua milo :** Ĝis la 5a de februaro jam aliĝis 1070 kongresanoj el 50 landoj. Je tiu dato pintis en la statistiko Francio, Germanio kaj la gastganta lando kun respektive 129, 122 kaj 115 registritaj aliĝintoj. Do, versajne sukcesa kongreso pro la nombro da partoprenontoj kaj bunda programo.

**Antaù kaj postkongresoj :** En la lasta bulteno ni mencias kelkajn antaŭviditajn E°-eventojn en Zagreb. Por malkovri la kongreslandon estas aliaj oficialaj aranĝoj : A1 -antaükongreso en Opatija kaj Istro (14-21 VII); A2 -antaükongresa krozo kun velšipa navigado laŭ la dalmataj urboj kaj insuloj (tuta semajno); P1 -postkongreso en Dubrovnik, klasigita de Unesco kiel parto de la mondakultura heredaĵo kaj naskiĝurbo de la fama mondvojaĝanto Marko Polo (tuta semajno); P2 - Velšipa krozado al la mirindaj insuloj de Dalmatio (tuta semajno).


### De Parizo al Zagreb :

E°-France proponas grupvojaĝon al la UK. Foriro vendredon la 20an de julio vespero de Roissy, kongressemajno kun loĝado + matenmanĝoj en kvarstela hotelo apud la kongresejo. Reveno dimanĉon la 29an posttagmeze. Prezo de tiu vojaĝo -referenco N 1 - preskaŭ 5000 F. Alia propono -referenco N 2 - turisma programo en Kroatio ĝis Dubrovnik kun vizitoj, ĉiuj manĝoj (29 VII-3 VIII). N1+N2 = 9490 F en 2-personaj dormoĉambroj; Suplemento de 1850 F por unupersona ĉambro.

### De Liono aù Montpellier al Zagreb :

Busoj ankaù ruligas regule de tiuj urboj al Zagreb. Ekzemple el Liono, foriro vendrede je 13h30, alveno en Zagreb sabate, je la 8a matene. Ir-kaj reven-prezo 740 F.

El Montpellier estas iom pli komplike : rekta buso (Eurolines) ĝis Venizio, poste buso aù trajno ĝis Trieste kaj de tie (E°)-buso al la UK. Sur la revenvojo ebleco pasigi plurajn tagojn en Trieste je la Itala E°-kongreso.



Tipa motora  
velsipo uzata  
por la krozoj

## DIVERSAJOJ :

### Franca Akademio :

En la nova eldono de la "vortaro de la Franca Akademio" la vorto "esperanto" aperos. Decidu vi mem, ĉu la difino estas pozitiva! Ne estas klare, ĉu la lingvo estas ankoraŭ uzata.

## DICTIONNAIRE DE L'ACADEMIE FRANÇAISE

9e EDITION

ÉOCÈNE à ÉTENDUE

\*ESPÉRANTO n. m. XX<sup>e</sup> siècle. De *esperanto*, « celui qui espère », dans la langue créée par L. Zamenhof.

Langue artificielle conçue à la fin du XIX<sup>e</sup> siècle, à partir des langues romanes et germaniques, et dont le créateur, Lazare Zamenhof, espérait qu'elle servirait la compréhension et la paix entre les peuples en devenant langue de communication internationale.

### Biciklistaj karavanoj al Strasburgo :

(al la Tejo-Kongreso 29 VII - 5 VIII)

Kvar karavanoj estas nun planitaj : la norda (Londono, Bruselo, Luksemburgo)

Informo : [cirilo@freesurf.fr](mailto:cirilo@freesurf.fr)

la orienta (Bresto, Varsovio, Berlino...) [chasseur@mail.ru](mailto:chasseur@mail.ru)

la suda (Barcelono, Líona, Bazelo) [xgodivier@esperanto.org](mailto:xgodivier@esperanto.org)

la okcidenta (Vannes, Angers, Parizo...) [xgodivier@esperanto.org](mailto:xgodivier@esperanto.org)

Ankaŭ postkongresa karavano al Parizo, Rennes, Mondekstremajo Finisterre (informas Cirilo).

Neesperantistoj ankaŭ bonvenas, kondiĉe ke ili pretu eklerni la Lingvon Internacian dumvoje (tuja aplikado dum la vespermanĝoj, kiam ĉiu kune manĝas kaj babilas).



### Bretonio invitas (kun aù sen biciklistoj)

Venu al Bretonio ĉi-somere por studi esperanton (tri niveloj), kanti, turismi, iniciigi al Internet,ktp de la 18a ĝis la 14a de Auggusto en Plouezec. Informoj je la tel-n° : 02 96 22 77 17

Lingvaj semajnoj ankaŭ ekzistas en nia regiono, se vi ne volas vojaĝi tro malproksime  
-en Agde en majo (19-26)  
-en Sète marborde en auggusto (25/8-1/9).



### Restado sur insulo (Malto) :

